

EKO 2023



Nia aganto pri
instruado kaj
progreso

Pensu globe, Agu loke! Por la Landa kaj Faka Laboro

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj



EKO 2023 / 36. Junio 21, 2023

Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK.

Kunlaborantoj (lingva kontrolo): Rob Moerbeek, Elda Doerfler, Gbello Koffi.

Pezo: Word nur teksto: 40 KB; Ĝia sveltigita PDF: 367 KB. Sume: 405 KB.

temas nur pri PDF, kiun SMG mem alkroĉis. La pezo de aŭtomate kreitaj PDF ne estas anticipi koneblaj.

AMO 100 en Hungario kaj tra la mondo

La 20-a de junio heroldis la centan seminarion de la AMO-programo. La ĉeesta parto okazis en la hungara urbo Tiszafüred, kun la partopreno de la prezidanto kaj vic-prezidanto de HEA (la LA de Hungario), kaj la komitatano por Hungario ĉe UEA. La virtuala parto de la seminario allogis ĉ. 15 personojn el sep landoj. La kvin-tema skemo por la seminario estas delonge dissendita. Tiuj temoj estas la kulturo, la landaj asocioj, la faka agado, niaj kongresoj kaj niaj komunikaj rimedoj. Diskutinte laŭ tiu skemo, la celo estis formuli rekomendojn por la estonta progreso de la movado. Kvankam limigita nombro da homoj partoprenis, altis la nivelo de diskuto kaj la multaj tre ambiciaj rekomendoj. Se eĉ duono el ili realiĝos, la centa seminario povos esti taksata sukceso. Pro la ses paĝoj da dense skribitaj notoj, ni ne povas jam prezenti la rezultojn detale; tio sekvos pli poste.

Internacia pacagado de UN

Oni festis en Hago, Nederlando, la 75-jaran pacgardadon de Unuiĝintaj Nacioj (UN) kaj 20-jara Internacian Tagon de la Pacgardantoj. Fine de majo okazis la solena memorfesto de 75 jaroj de Pacgardado (1948 - 2023) kaj 20 jaroj de la Internacia Tago de la Pacgardanto (2003 - 2023). Gastigis nin la Urbo de Paco kaj Internacia Juro, Hago, kies vicurbestro substrekis la longan tradicion kun la Pacpalaco. Sur la tereno de oftaj manifestacioj, Malieveld, kun regaloj en la apuda pavilono, ni vidis konstruaĵon el 17 kubaj skatoletoj, ĉiu kun indiko de celo por daŭripova evoluigo. Por la



pacagado aparte gravas la lastaj du: paco kaj partnerecoj. Altranguloj, i.a. la defendministro, Kaisa Ollengren, starigis du florkronojn kaj post ĉiuj alparoloj ni en longa vico povis aldoni nian kunportitan floron honore al la pli ol 4000 batalmortintaj pacgardantoj.

Ni aŭdis, ke la situacio por la pac-trupoj nur pli malfaciliĝis kun la jaroj; ribelantoj neniel respektas la pacan mesaĝon de UN. Eĉ la iniciatinto de la solenaĵo mem, Caecilia van Peski, iama prezidanto de la Nederlanda Asocio por UN (NVVN), nun ano de la konsilia konsilantaro de NVVN, en misio en Kartvelio grave vundiĝis. La tuton ilustris armea blorkestro kun deko da muzikaĵoj, rave prezentataj, kaj fine la surprize gaja Pacmarŝo "Paco per Juro". Por doni impreson pri la parolado de ĉi tiu modesta heroo jen kelkaj frazoj el la komenco:

UN en la pasintaj 75 jaroj savis sennombrajn vivojn kaj en multaj landoj alportis pacon kaj stabilecon. Sed kvankam Pacgardado de UN en 1988 ricevis la prestiĝan Nobelpremion pri Paco, ĝi sola ne povas sukcesi krei la necesajn kondiĉojn por ĉesigi konfliktojn kaj garantii daŭrajn politikajn solvojn. Ĝiaj partnerecoj kun Membroŝtatoj, la societo, ne-registaraj organizaĵoj, UN-programoj, fondusoj kaj agentejoj kaj aliaj partioj estas fundamente gravaj por alporti konkretajn plibonigojn en la vivo de ordinaraj homoj rilate ekonomian disvolvado, la juran staton, virinajn rajtojn, homajn rajtojn, sanon kaj instruadon. (el la CDE: celoj por daŭripova evoluigo)

De tiam servis pli ol du milionoj da virinoj kaj viroj en 72 pac-misioj de UN, kiuj senpere influis la vivon de milionoj da homoj kaj savis sennombrajn vivojn. Nuntempe pacgardado de UN engaĝas pli ol 87.000 militistojn, policanojn kaj civilulojn en 12 operacioj. NVVN honorigas ankaŭ la preskaŭ 4.200 pacgardantojn, kiuj ekde 1948 perdis la vivon sub la standardo de UN. Oni ne forgesis la junularon: i.a. lernantino de Unesko-alianca lernejo, la Kristana "Kolegio" Nassau Veluwe, angle deklamis tekston el "Mark-ŝtonoj" de Dag Hammarskjöld.

Rob Moerbeek

Mem laboru por la Universitato de UN

Esploru la eblojn mem: <https://careers.unu.edu/>

Multlingvisma ligo en kvar lingvoj

Mi ĝojas anonci, ke aliĝo por la kunveno pri multlingvismo nun estas disponebla.

Jen [la ligilo](#) kaj la fina dokumento en Esperanto, la angla, la franca kaj la hispana.



Francis M. Hult, PhD, FRGS, University of Maryland, Baltimore
Reprezentanto de Universala Esperanto-Asocio ĉe UN.
Prezidanto de la NGO Komitato pri Lingvo kaj Lingvoj.

Nitobe tuj antaŭ la UK

La programo de la 9-a Nitobe-Simpozio (Torino, 28-29 julio 2023, tuj antaŭ la Universala Kongreso de Esperanto) estas havebla en la tri laborlingvoj ĉe la retejo de CED:

<https://interlingvistiko.net/lingvopolitiko/nitobe-simpozio-2023/>

La titolo de la simpozio estas "75-a Datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj: kiu estas la stato de efektivigo de lingvaj rajtoj?"

La aliĝo estas senpaga, sed deviga pro organizaj kialoj. La aliĝilo ĉi tie:

<https://docs.google.com/forms/d/e/1FAIpQLSek-8GebioOFYtuvSQprOQixin6Ff0dtJXmqPTYmTMF2InJ7A/viewform>

Michele Gazzola : www.michelegazzola.com

La Azia komisiono montras sin el Vjetnamio

La Estraro de la Komisiono de Azia-Oceania Esperanto Movado (KAOEM) kreis enketilon por havi superrigardon pri Edukado kaj Trejnado en Azio kaj Oceanio.

<https://forms.gle/3mQM2A5Xd4Lf3huR6>

Ĉu vi povus helpe al KAOEM plenigi la formularon aŭ plusendi ĝin al instruistoj kaj kursogvidantoj en via lando? Mi ankaŭ ŝatus profiti tiun ĉi ŝancon por enketi la interesiĝon pri Magistraj studoj kaj Postdiplomaj studoj en Poznano. Se vi konas iun interesiton, bv kontakti min hoantran37@gmail.com aŭ Ilona koutny.ilona@gmail.com



Hoan Tran

Vjetnama Esperanto-Asocio (VEA)

Vjetnama Esperantista Junulara Organizo (VEJO)

+84 39 8060 493 | Skype: [tranthihoan37](https://www.skype.com/user/hoantran37) | Hanojo, Vjetnamio



Brazila Kolekto

Ĉi-semajne *Brazila Kolekto* alportis al vi kvar muzikaĵojn, el kiuj 3 havas videon, kaj el tiuj unu estas originala komponaĵo. Ni komencu per la originala komponaĵo: "Sovaĝa animo", verkita de Rafael Milhomem, de la Bando BaRok-Projekt', estas roko pri la unuaj loĝantoj de Brazilo, la indiĝenoj, kaj ties bonaj ekzemploj por la tuta mondo. Ĝin akompanas video. Eveline Paŭla registris videon de la fama kanto *Mia bon', mia malbon'* (originale *Meu bem, meu mal*), verkita de **Caetano Veloso** kaj tradukita de **Flávio Fonseca**. Jen laŭda kanto pri Brazilo, verkita de **João de Barro**, ankaŭ konata kiel **Braguinha**: *Kie ĉiel' blua multe pli bluas* (originale *Onde o céu azul é mais azul*), laŭ traduko de



Darcy Gaia: La traduko *Rozo de l'ventoj* (el la originalo *Rosa dos ventos*, de **Chico Buarque**) ricevis videon registritan de **Flávio Fonseca**. Pro aŭtorrajtaj kialoj nur peco de la video aperas en la retejo kaj en la jutuba kanalo; tamen, ĝi spekteblas komplete en **BrazilMuzika Klubo**. Krome la komplete video de *Rozo de l' ventoj*

en la Ĉambro **Nepublikaj videoj**, estas aldonitaj du **Premieroj**, tio estas, videoj nur publikigitaj post unu monato en Brazila Kolekto. Ili estas: *Freŝaj larmoj*, originala komponaĵo de Brunê kaj Fábio Santos (vidu la bildon).

Universitata planado multlanda

La kunveno en la 5-a de junio estis tre tutmonda kun partoprenantoj el Brazilo, Eŭropo, Barato kaj Ĉinio kaj tre interesa rilate al la enhavo. ni aŭskultis de Philippe Planchon pri la agadoj ligitaj al Esperanto en la universitato de Tours en Francio kaj interŝanĝis infomojn pri Esperanto-agadoj en universitatoj en Brazilo, Hispanio, Irano, Barato kaj en Rumanio en la tempoj de la Akademio Internacia de Sciencoj (AIS).

Zaozhuang-Universitato – dulingva filmo

Movada muzea moto: ‘Malgranda lingvo Esperanto ligas la grandan mondon’.

La suba filmeto prezentas la Universitaton de Zaozhuang kaj ĝian agadon en Ĉinio. La universitato havas kvar-jaran Esperanto-fakon agnoskitan de la registaro, kaj la plej grandan Esperanto-muzeon en la mondo. La du-lingva subteksto, en Esperanto kaj en la ĉina, helpas la komprenon, sed atentu pri kelkaj lingvaj eraretoj.

https://uea.facila.org/filmetoj/zaozhuang-universitato-malgranda-lingvo-esperanto-ligas-la-grandan-mondon-r243/?fbclid=IwAR0b_rqijitlzQuYtrn_CliIsvuGqhtxTd9JqnuY1NTymfmNd_8E7RwHhfg

Tambura tumulto

“Amata venu” estas la unua kanto de la ĵus aperinta albumo "Ludu kaj kantu" de nova esperanta stelulino: Klarisa. Kaj vi tre ŝatos ĝin!”

<https://youtu.be/93tnOPFyJUw>

mga



Aminda radio peras zazavavaĵon

La ELSENDO N°131 de Aminda Radio Esperanto proponas al vi la duan parton de sia kultura artikolo pri malhelpoj kaj malpermesoj rilate geedziĝon en Malagasio. Alia interesa temo koncernas la « zazavavindrano » aŭ ia speco de feino priloĝanta la akvajn areojn en la lando. Krom tio, vi povas sekvi ankaŭ kelkajn novaĵojn de la kuranta monato. Ni ilustras nian podkaston per iu bela kanto de la bando Konga Espero. Pro frua sonregistrado de tiu ĉi elsendo, ni enmetos en la venontan podkaston nekrologon pri la forpaso de nia kara amiko Ralalarisoa Justine (Lala). Ni bondeziras agrablan aŭskultadon! <<https://youtu.be/UEtSrTaHxeg>>

Henriel FIDILALAO, MG 102 AMBOHIDRAPETO, Madagaskaro
+261 (0)32 53 035 93 Skajpo: belafino. Respondeca pri AMINDA RADIO
WeChat ID: henriel2018; Whatsapp: +261325303593, LinkedIn kaj Fejsbuko.

===== vortoj: 1135 =====

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikilo estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunajo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.: La kolekto de EKO:

<https://www.ilei.info/agado/EKO.php> por 2023 (ĝis 30.).

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill@ce@gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolisto.